



Boletín

Nº 444 Oktobro - Decembro 2023



Asociación de utilidad pública

Boletín
Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 444

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: José Antonio del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio
Federación Española de Esperanto

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31

0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926

4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon

en la aŭtomata respondilo

	Estraro
Prezidanto:	Ángel Arquillos López
Vicprezidanto:	Alberto Granados Orcero
Sekretario:	Manuel Parra
Vicsekretario	Isidoro Ortega López
Kasisto.	Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj:	Vicente Manzano (Viko)
“	Ana Manero

Prezidanto HEJS

kaj voĉdonanto: Guaroa Emmanuel González.

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400 (pdf-a)

ISSN 2444-8397 (papera)

SALUTVORTOJ

Milito estas malbena vorto, kiun ni prononcas kun timo kaj malkonfido, kun honto kaj kolerego. Kion fari por haltigi la buĉadon, kiu kulpas? Estas klare ke la popolo tute ne kulpas, la afero estas politika kaj per dialogo oni devus solvi la problemon. Espereble ke la nova jaro pripensigos la gvidantojn kaj respondeculojn de la terura buĉado.

En ĉi bulteno vi ĝuos la raporton pri la hispana kongreso, kun nombraj bildoj pri la evento, krom la kutimajn novaĵojn pri fervojoj, distroj kaj kuriozaĵoj kaj specialan artikolon verkita en la hispana pri la historio de Esperanto kun interesaj moneroj pri la lingvo, kaj pozitivaj novaĵoj pri la HEK okazonta en Valencia provinco, kies LKK laboradas por trovi la plej taŭgan ejon kaj certe ili sukcesos.

Mi ne laciĝas peti vian kontribuon, ĉar la enhavo de Boletín temas pri la Movado, ĉefe en Hispanio, do temas pri ni ĉiuj.

Mi profitas la okazon deziri al vi ĉiuj, Feliĉan Novan Jaron, malgraŭ la militoj, kiuj detruas la estonton de multaj senkulpuloj kaj suferigas la homaron.

Ángel Arquillos

Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Scienca Kalendaro	2
Protokolo Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
La maro de Valencio	4
81a Hispana Antaŭkongreso de Esperanto en Sevilo	6
81a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo	8
Fundación Esperanto	10
La Amsterdama Katedro	11
Fervoja Angulo	13
Pri Grupoj kaj Asocioj	16
Apero en amaskomunikiloj	20
Universitato	22
Kongresoj kaj renkontiĝoj	23
Presencia del Esperanto en la numismática	24
Iom da matemático (12)	31

Frontpaĝo: Komuna foto de la 81a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Sevilo

SCIENCA KALENDARO EN ESPERANTO ANKAŬ EN 2024

Denove en 2024 ni havos version en Esperanto de la Lerneja Scienca Kalendaro, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC). Temas pri kalendaro en kiu ĉiutage oni kunmemoras datrevenon de scienca atingiĝo aŭ de sciencisto, kun speciala fokuso en diverseco. Pri la presentado raportis la CSIC la 9an de januaro: <https://eventociencia.es/calendario-cientifico-escolar/>

Bedaŭrinde ĉijare ne estas pdf-versio, sed vi povas trovi aliajn formatojn en: <https://digital.csic.es/handle/10261/341368>.

Krome, oni povas ĉiutage sekvi la datrevenojn en la konto de la retejo X (antaŭe Twitter), ĉe: <https://twitter.com/SciKalendaro>



PROTOKOLO

Ordinara Ĝenerala Kunveno 12 okt 2023

La 12-an de oktobro 2023 je la 17:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kadre de la 81a Hispana Esperanto-Kongreso okazanta en Sevilo, avenuo Blas Infante 4, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (21a de majo 2023)
- 2.- Komentoj pri la dokumentoj kiuj estis formale aprobitaj en la antaŭa kunveno
- 3.- Membro-kotizoj por la sekva jaro
- 4.- Projektoj por la sekva jaro
- 5.- Kie okazos la venontjara kongreso
- 6.- Sugestoj kaj demandoj

Ĉeestantoj:

Partoprenas la kunvenon 26 individuaj membroj de HEF, du el ili reprezentataj, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Kantabra, Bilbaoa, Madrida (Liceo), Liberano (Teruelo), Andaluza, Frateco (Zaragoza), kaj Ekstremadura.

1- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (21a de majo 2023)

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 442. Oni aprobas ĝin unuanime.

2- Komentoj pri la dokumentoj kiuj estis formale aprobitaj en la antaŭa kunveno

La kasisto klarigas iujn enspezojn kaj elspezojn, kaj la ĉeestantoj aprobas la klarigojn.

3.- Membro-kotizoj por la jaro 2024

Aperas la propono altigi la membro-kotizojn. Post debatado, oni aprobas altigi nur la jarajn kotizojn por la membroj kiuj ricevas la bultenon papere (OM), la kolektivaj (KM) kaj la patronaj (PM). Oni voĉdonas pri la kvanto de la nova ordinara kotizo. Por 35€ estas 4 voĉoj; por 40€ estas 10 voĉoj; por 50€ estas 5 voĉoj.

Do por 2024 la ordinara kotizo estos 40 eŭroj. La kotizoj de patrona membro kaj kolektiva membro estos 80 eŭroj.

La membroj kiuj ricevas la bultenon elektronike konservas la saman kotizon (30 €), kaj tiel oni instigas homojn iri al tiu kategorio. Ankaŭ la kotizoj por junuloj kaj homoj kun malfacilaĵoj ekonomiaj konservas siajn ĝisnunajn kotizojn.

4.- Projektoj por la jaro 2024

Daŭras la laboroj por fari bitan eldonon de la libro de Antonio Marco *Analoj de la Esperanto-movado en Hispanio*.

5.- Kie okazos la venontjara kongreso

La HEF-prezidanto parolis kun la prezidanto de la grupo de Valencio kaj ricevis tre pozitivan pretecon de la tieaj samideanoj por organizi la 82an HEK.

6.- Sugestoj kaj demandoj

6.1. Oni informas, ke ĵus kreiĝis la hispana sekcio de ILEI, kaj ĝi intencas teni ĝeneralan kunlaboron kun HEF. Ĝia retejo estas <https://ilei.esperanto.es/>

6.2. En 2024 estos elekto de nova estraro. Eventualaj kandidatoj jam prepariĝu.

6.3. Aperas demando, kiel oni decidis la aliĝkotizon por ĉi tiu kongreso. La sekretario klarigas, ke ĝi estas iom pli alta ol en aliaj okazoj ĉar la kongresejo estas pagenda.

La kunveno finiĝas je la 19:00 horo.

Manuel Parra
Sekretario

LA MARO DE VALENCIO BONVENIGOS VIN AL HEK KAJ POST-HEK 2024

La ĉi jara Landa Kongreso de HEF okazos en la provinco Valencio en la monato septembro. Tie la LKK, kiu konsistas el naŭ lokanoj (Ana de Londono-Bétera, Carmen de Valencio, Dennis de Cullera, Elías de Valencio, Luis de Mislata, Niko de Bétera, Pau de Alcira, Pepe de Cheste, Raúl de Valencio, kaj Rosa de Cheste), nun laboras por organizi la Kongreson, kune kun la helpo de kvar kongreso-spertaj konsilantoj (Alberto de Teruel, Ángel de Malaga, Laura de Italio kaj Tonjo de Madrido).

Ni pensas pri la apudvalencia urbeto Cheste kiel kongreso-urbo, kaj pri Valencio mem kiel la loko de postkongresaj aranĝoj: turistaj vizitoj, esperanta ĉiĉeronado, muzeoj, plaĝoj, valencia kulturo kaj kuir-arto. Krome, eventuale, por la Kongresanoj kiuj volas resti pli longan tempon kaj sperti post-postkongresan etoson, eblas ĝui la belajn septembron kaj oktobron de la marbordo en Valencio kaj eĉ en Cullera. Vi povas esperantumi longan tempon kun ni post la Kongreso.

La ĉefa defio nun estas certigi la taŭgan kongresejon. Nia prefero por la kongreso-loko kaj la kongresejo estas la Universitato Laboral de Cheste. Tie la prezoj estas favoraj, kaj ni havos tri prelego- kaj kunveno-ĉambrojn, kune kun belega, bon-akustika salono. Ideala loko por la Malfermo, la Fermo, kaj ĉiaj prelegoj kaj kunvenoj. Krome, eblas apudmeti la libro-servon, ekspozicion kaj eĉ fulmokursojn por eventuala ekstera publiko. La universitata restoracio disponeblas, kaj simplaj, studentaj dormoĉambroj lokiĝas sur la tereno de la universitato. Ne malproksime estas iom pli luksa hotelo, de kiu veturilo aŭ piede eblas atingi la Kongresejon.





Dum la Universidad Laboral estas nia prefero -- kaj nia teamo de 9 Esperantistoj jam vizitadis tiun universitaton dum kvin horoj akompanate de la estro mem – antaŭ paro da semajnoj okazis malbonŝanca malglataĵo: la oficiala, subskribita kongreso-peto de la Valencio Esperanto-Grupo atingis la estron de la Universitato, sed ĝuste en la tago en kiu la estro devis subskribi kaj sendi ĝin al la Generalitat de Valencio por oficiala aprobo – li estis subite eksigita, kaj lia universitata konto blokita. Politika ŝanĝo. Ho ve! La problemo nun estas, ke la registaro de Valencio ankoraŭ ne nomis novan estron, kaj nur tiu estro rajtos pludoni nian peton al la Generalitat.

Ni estas optimistaj pri la Universidad Laboral de Cheste, sed ni tamen devas ankaŭ havi iun Planon B por trovi, se necese, ian alternativan kongresejon. Kaj nun kvin LKK-anoj telefonas, vizitas kaj parolas kun diversaj Valencianoj (hoteloj, eventejoj, ĉirkaŭurboj) por preto-havi tiun duan planon. Intertempe, ni devas atendi la disvolviĝojn de la politika proceso de la Universidad Laboral.

Do, vi havos, kiel ĉiam, la Hispanan Landan Kongreson de Esperanto, ĉi foje en septembro, en la bela provinco Valencio, espereble en Cheste, kun interesa post-kongreso en la urbo Valencio. Pensu pri septembro, pensu pri Valencio, kaj, kiel ĉiam, antaŭĝoju pri la verda etoso, en kiu vi amike parolos Esperanton kun viaj geamikoj el Hispanio kaj el la tuta mondo.

Dennis Keefe
prezidanto de la LKK, HEK 2024

HISPANA ANTAŬKONGRESO DE ESPERANTO EN SEVILO

10a kaj 11a de oktobro 2023



En sevila universitato (fakultato pri filologio) okazis *Internacia Seminario pri Sociaj Retoj kaj Homa Konduto* konsiderata kiel la hispana antaŭkongreso. La seminario estis organizita de "Civiencia" sub la gvido de la universitata profesoro pri psikologio Vicente Manzano Arrondo (kromnomo Viko), kiu sukcesis arigi plurajn universitatajn profesorojn de la mondo kaj aliajn gravajn personojn por prezentado de interesaj prelegoj. Ni povis aŭdi prelegantojn el Hispanio, Francio, Germanio, Italio, Irano, Japanio, Kostariko, Rusio, Serbio kaj Usono.



Viko malfermis la seminarion kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Poste alparolis nin la UEA-prezidanto Duncan Charters. La seminario estis tre intensa, foje la tekniko misfunk-

ciis, sed tamen ĉiuj prelegoj povis okazi ĉeeste aŭ virtuale. Dum la prelegoj okazis samtempa interpretado inter Esperanto kaj la hispana lingvo. Al la seminario venis ankaŭ kelkaj studentoj kiuj antaŭnelonge komencis lerni Esperanton. Dum la seminario estis pritraktataj diversaj interesaj temoj, sekvis debatoj, planado de projekto Erasmus Mundus kaj la jenaj konkludoj:



Aperis ideoj por realigo de projektoj - informteknologia evoluo helpas al esperantistoj por plibonigi la movadon - neceso revivigi la sciencan revuon - teknoevoluo helpas, sed la homo gravas - lerni kiel instrui la lingvon kaj la sociajn retojn - utiligi sociajn retojn kaj AI-n (Artefarita Intelekt) por edukado kaj komunikado - profiti de la universitatoj - videbligi kaj realigi originalajn projektojn per Esperanto - ĉio, kio aperas en Esperanto estu fidinda.



Liba Gabalda



81-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SEVILO

12-15.10. 2023

Okazis en la tre bela andaluza urbo Sevilo, nomata perlo de Andaluzio. Post Madrido, Barcelono kaj Valencio ĝi estas la kvara plej granda urbo en la lando. Trafluas ĝin la rivero Guadalquivir. Sevilo famas pro flamenko-danco, taŭro-bataloj kaj aliaj tradiciaj festoj. La katedralo de Sevilo estas la tria plej granda en Eŭropo. Imponas ankaŭ la reĝpalaco *Alcázar*, unu el la plej antikva en Eŭropo kaj la plej bela en Hispanio. La majesta katedralo Sankta María 130 metrojn longa kaj 76 metrojn larĝa estas la kvara plej granda en la mondo. La ĉefplaco *Plaza de España* estas belega duoncirkla historia monumento. Alia simbola monumento estas la *Torre del Oro* (Ora Turo), en kiu troviĝas la muzeo pri maraĵoj. En Sevilo oni trovas monumentojn de romiaj, arabaj kaj eŭropaj stiloj, multajn parkojn, muzeojn kaj aliajn belaĵojn. En la urbo moviĝas 99



ĉeval-ĉaroj por promeniĝi turistojn. Dum la kongreso ne estis multaj eblecoj vidi ĉion vidindan. La sabatan matenon esperantistoj povis viziti la Belartan muzeon. Ĉe la metroo-stacio *Puerta Jerez* ekstere en la apuda pasejo estis instalita ekspozicio de pentraĵoj de famaj pentristoj el la muzeo de Prado.

La kongresa temo estis: "Komprenemo inter popoloj". Pri ĝi amplekse prelegis ĉe la fino de la kongreso la prezidanto de UEA Duncan

Charters. Al la kongreso aliĝis pli ol cent kvindek geesperantistoj el pli ol dudek landoj. La kongreson partoprenis krom la prezidanto de UEA kun sia edzino ankaŭ la ĝenerala direktoro Martin Shafer kun sia familio. La kongreso okazis en la andaluza sidejo de UGT (ĝenerala unio de laboristoj).



La inaŭguro okazis vendrede je la 10-a horo en la salono Zamenhof. La ĉeestaron alparolis salutante Antonio Rodríguez Gasch, José Roldán León (prezidanto de LKK), Ángel Arquillos (prezidanto de HEF), Duncan Charters (prezidanto de UEA), Laŭra Brazabenni (Itala Esperanto Federacio) kaj Rodica Todor (IFEF prezidantino). Sekvis salutoj de aliaj asocioj kaj muzika paŭzo. Poste ni povis spekti filmojn pri Esperanto en Tubaro. Unue Pablo Busto klarigis kiel akiri ilin. Gabriela Manzano kun sia patro Viko prezentis kelkajn amuzaĵojn el "PIKA PIKA ESPERANTO". Aliloke okazis kurso por komencantoj. Sekvis prelego: "Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en Esperanto", "Instruado de Esperanto en la andaluza publika edukstemo" al kiu alvenis kelkaj studentoj de la mezlernejo. Poste ni ĝuis teatraĵon "La akuzantivo aŭ la kazo pri mal-klera tatuisto" prezentita de la "Talenta Teatra Trupo". Sekvis prelego "Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco". Akompane de citero ni povis aŭskulti poeziaĵojn prezentitajn de Ana Manera kaj Ángel Arquillos. Pri la spaca programo Artemis kaj reveno al la Luno interese parolis Carlos Spinola. La lasta prelego mallongigita pro manko de tempo temis pri ĉinaj ideogramoj.



Sabate posttagmeze estis prezentita la teatraĵo "La gazetara konferenco" fare de la "Talenta Teatra Trupo". Aliloke okazis ateliero pri Esperanto. Sekvis prelegoj: "Minimumismo bonas" kaj "La bibliotekoj tra la historio". Vespere ni spektis pupteatron kaj grupo de bele vestitaj kastanjet-ludistinoj prezentis belan spektaklon en la ritmo de aldonita muziko.

Dimanĉe matene ni spektis la teatraĵon "La pomo de Adam". Poste okazis aŭkcio gvidata de Tonyo del Barrio. Sekvis prelego de Duncan Charters kaj la oficiala fermo de la kongreso. Dum tiuj tagoj regis varma (eĉ varmega) suna vetero, do multaj plene interesiĝis pri la kongresa programo. Oni povas konstati, ke la kongreso estis sukcesa kaj bonetosa. Koran dankon al la organizantoj pro tiu agrabla evento.

Liba Gabalda

FUNDACIÓN ESPERANTO:

INFORMADO PRI 2023

La helpoj programitaj por 2023 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 440 de Bole-
tín" (okt-dec.2022 p. 3) de HEF.

Ni decidis destini la jenajn helpojn:

- Universala E-Asocio: 600 €. Por helpo al unua UK okazonta en Afrikoj. Tiu eksteror-
dinara evento igis nin decidi fari tian eksterordinaran decidon.
- E- Grupo de Bilbao: 450 €. Pro organizado de kursoj.
- Rita Barrachina: 150 €, Pro publikigo de libro "Esperanto para hispanoparlantes".

La tuta kvanto estis multe pli alta ol planite danke al donacio de sindonema bonfarulo.

PROJEKTOJ POR 2024

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de Eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2024.

Kutime, ni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 1.000 €.

NOVA PATRONARO

Post la 4jara periodo de la antaŭa patronaro, komenciĉas alia.

La patrono aprobita konsistas el 4 patronoj (la 2 unuaj, nomumitaj de HEF):

- Lorenzo Noguero: Prezidanto.
- Pablo Conesa: Sekretario.
- Fernando Arroba: Vicprezidanto.
- Administranto: Víctor Martínez.

Krome, ne estas patrono sed kiel Direktoro estis (re)elektata José Antonio del Barrio.

Mi profitas la okazon por publike danki al Enrique Navarro (antaŭa patrono) pro ties
agado kaj helpemo.

Lorenzo Noguero
(Prezidanto de F. Esperanto)

LA AMSTERDAMA KATEDRO: ekde Nederlando al la tuta mondo

Federico Gobbo

Universitato de Amsterdamo

En la Universitato de Amsterdamo ekzistas speciala posteno por ordinara profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto, ekde la 1990aj jaroj. Ekde la 1a de februaro 2014 estas Federico Gobbo kiu estras la Amsterdaman Katedron – por mallonge ĝin indiki, kaj li pretas servi por tria mandato, t.e. ĝis la 1a de februaro 2029. Kvin jaroj ŝajnas longa periodo, tamen oni devas preti por garantii, ke la Amsterdama Katedro pluekzistu krom 2029 jam nun. Ĉefsponsoras UEA, ĉefe flanksponsoras Esperanto Nederland, kaj kunponsoras aliaj landaj asocioj, pli precize: Germana, Italia, Svedia, Svislanda (aktualigo: la 20an de novembro). Krom landaj asocioj, kunponsoras malavaraj individuaj bonfaruloj el la tuta mondo. Kial? Ĉar la Amsterdama Katedro gravas por la tuta Esperanto-Movado, trans la landlimoj. Estas kvar kialoj: historiaj, instituciaj, esploraj, kaj, laste sed ne balaste, instruaj.

La ĉefa historia kialo estas la profunda ligo inter Amsterdamo kaj interlingvistiko. Fakte, multaj fakuloj pri interlingvistiko pritaksas la leteron de Kartezio al Mersenne el 1629 kiel la eko de la fako, kaj tiam Kartezio loĝis en Amsterdamo. Alivorte, nia fako estas parto de la historio de la urbo, kaj pro tio, male al multaj aliaj lokoj de la mondo, interlingvistiko – kaj konsekvence Esperanto – ĝuas respekton kaj prestiĝon: nenie alie estas ordinara profesoro kun "Interlingvistiko kaj Esperanto" sur sia nomŝildo.

Laŭ la instituciaj kialoj la Universitato de Amsterdamo estas *top 100 university* tutmonde -- ne hazarde skribita en la angla.¹ Krome, indas substreki alian fakton, nome, ke la interlingvistika kaj esperantologia kolekto ĉe la universitata biblioteko estas unu el la plej gravaj en la tuta Eŭropa Unio.

Laŭ la esplora kialo, per publikaĵoj (ĉefe en la angla) de Federico Gobbo pri interlingvistikaj kaj esperant(ologi)aj temoj – al kiu la samrangul-revizio, *peer review*, forte oponas reziston – li gajnis multe da respekto inter siaj lingvistaj kolegoj, ĉar la bona pozicio de lingvistiko kadre de la Universitato de Amsterdamo en la internaciaj anglalingvaj klasifikoj estas ankaŭ, almenaŭ parte, merito de li. Hispanio ankaŭ ludas rolon en tiu ĉi sukceso. Post la partopreno ene de la 78a Hispana Esperanto-Kongreso kaj 21a Andaluzia Kongreso de Esperanto samtempe okazintaj en Malago, komence de Majo² 2019, li revenis okaze de konferenco EUROPHRAS, kiu lokiĝis en la Fakultato de Humanistiko, Teatinos Campus, de la Universitato de Malago, inter la 25a kaj 27a de septembro de la sama jaro³. Per Jutubo aperas diversaj prelegoj en Esperanto de la katedrulo, kaj ankaŭ li prelegis en la 4-a Virtuala Kongreso de UEA, 23-26 novembro 2023.

Tio portas nin al la kvara kialo: instruado. La procentaĵo de nederland(lingv)aj studentoj en liaj kursoj estas ĉirkaŭ 33%. Pro la uzo de la angla, li ege multobligis la nombron da studentoj, kompare al siaj antaŭuloj. Ĉefe la studentaro kiu sekvas liajn kursojn venas de la tuta Eŭropo sed ankaŭ de Orienta Azio⁴. Ne mankas studentoj el Hispanio, kaj studentoj de la kataluna kiel minoritata lingvo. Tiu ĉi fakto montras, ke Esperanto en la Universitato de Amsterdamo estas vere internacie lernata.

Fine, ĵus aperis en Revuo Esperanto (1385(12), decembro 2023) artikolo priskribante pli detale la freŝdatan agadon ĉe la Amsterdama Katedro. Temas pri unua artikolo de nova serio, *Pri katedro sed ne el katedro*, por disvastigi Esperante la esplorajn rezultojn jam publikigitajn en aliaj lingvoj tra fakaj kanaloj.

Permesu fini parafrazante Zamenhofan eltiron el la *Aldono al la Dua Libro 1888*: malgraŭ la disĵeteco de l' laboro (se ĝi nur estos ĉie sufiĉe energia) post la plej mallonga tempo ni vidos, ke nia komuna celo estas alveninta, ke la Amsterdama katedro fortiĝis kaj estas uzata de la tuta mondo.

Se vi pretas finance subteni la katedron bonvolu sendi vian kontribuon al: Universala Esperanto Asocio, Rotterdam, Nederlando ĉe banknumero: NL72INGB 0000 3789 64 (BIC/SWIF: INGBNL2A) menciante Amsterdama Katedro.

1 Fonto: <https://www.uva.nl/en/about-the-uva/about-the-university/rankings/rankings.html>

2 Bonvolu spekti la videon de lia konferenco pri Briteliro: <https://youtu.be/A8lZjoUJOdc?si=9IzB-4SASweL97Lz>

3 Aktoj de la konferenco, anglalingve: Gobbo, Federico (2019). Constructive Linguistics for Computational Phraseology: the Esperanto Case. E-proceedings, Accepted paper at: *EUROPHRAS2019*. Malaga, Spain. September 25-27. Tradulex. DOI: [10.26615/978-2-9701095-6-3_010](https://doi.org/10.26615/978-2-9701095-6-3_010). URL: [E-proceedings](#), 78–85.

4 Bonvolu spekti la videon de la studentoj kiuj sin prezentas: <https://youtu.be/3MPJHI-z-74>

FERVOJA ANGULO

FERVOJAJ SIGNALOJ


Preskaŭ ĉiuj konas formojn, kolorojn kaj signifojn de la signaloj troviĝantaj sur la vojoj kie trakuras aŭtomobiloj. Kontraŭe, tiuj signaloj kiuj reguligas la fervojan trafikon apenaŭ estas konataj. Ni klopodos klarigi ion pri ĉi tiu temo.

Fervojaj signaloj utilas por averti al lokomotiv-ŝoforo pri la kondiĉoj de la vojo, ekzistantaj post la punkto kie stariĝas la signalo. Do, estas necese meti tiujn signalojn sufiĉe antaŭ tiu punkto, ekzemple, se temas pri haltigo de la vagonaro, estas necese diri, ke trajno bezonas eĉ pli ol unu kilometro por haltiĝi. Lastatempe, la ŝoforo ricevas signalojn aŭtomate en la kajuto, tamen ankoraŭ estas videblaj ofte signaloj starigitaj flanke de la relo. Ni vidu, kiel ili estas kaj ties signifon.

Signaloj povas uzi lumon por sciigi sian averton. Do, ili funkcias pli malpli kiel semaforo. Ili povas esti vertikalaj semaforoj, similaj al tiuj kiujn ni trovas en ĉiuj urboj, aŭ malaltaj semaforoj, kiuj troviĝas sur la planko apud la relo. Jen ili:




Surplankaj semaforoj




Vertikalaj semaforoj

Signaloj ankaŭ povas konsisti el fosto. Temas pri metalaj fosto starigitaj flanke de la relo. La orientiĝo de la vertikala aŭ oblikua fosto indikas unu aŭ alian signifon al kondukisto de la vagonaro.




Fine estas eble vidi ankaŭ signalojn kun literoj aŭ ciferoj, tre similaj al tiuj kiuj aŭtomobil-ŝoforoj trovas flanke de aŭtoŝoseoj


Fervoja fosto




Ni vidu nun, kion signifas tiuj signaloj.



La konduktisto povas iri antaŭen. Ekzistas neniuj obstakloj por la vagonaro.
(semaforo verd-kolora)



Averto pri proksima signalo por haltigi la vagonaron.
(semaforo flav-kolora)



La vagonaro devas haltiĝi.
(semaforo ruĝ-kolora)



Signaloj por limigi la rapidon estas tre similaj al tiuj uzataj por aŭtomobiloj en la ŝoseoj, kvankam pro la fakto, ke la vagonaro bezonas longan spacon por haltiĝi, oni devas unue averti pri la proksima ekzisto de rapid-limigo kaj poste, pri la punkto kie la rapido devas esti limigita. Ni vidu:



Ekde ĉi tie la vagonaro ne povas superi ĉi tiun rapidon.



Rapidec-limigo estas nuligita.




Se aperas diversaj rapid-limigoj, ĉiu el ili rilatas al malsimila tipo de vagonaro
 Ekzistas aliaj signaloj kun pliaj informoj por la vagonar-konduktisto, ekzemple:




La venonta stacidomo estas fermita.



Oni devas sonorigi hupon



Oni informas pri la frekvencozone uzebla por komunikoj inter vagonaro kaj stacidomo aŭ kontrol-centro.



Vagonaro ne povas antaŭeniri post ĉi tiu punkto.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj
 HAFE

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.websself.net>

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Aragono

Zaragozo

En Zaragozo, proksime de la 15a decembro, ni volis celebri la naskiĝon de "la koro sopira venki en decida horo: la kuracisto de l' homaro muta, kaj en la blinda mond' okuldoktoro". Kaj okaze de Zamenhof-Tago (laŭ sugesto de Julio Baghy en 1927), ni emis festi la Libro-Tagon.

Por celebri la Libro-Tagon, ni volis substreki la gravecon de nia literaturo. Tiucele, okazis prelego de Lorenzo Noguero: "Ni bezonas Kalman Literaturon". La titolo celis konkrete al K. K. kaj abstrakte (aŭ metafore) al nia kvalita beletro (kiu komunikas kalman harmonion). K. K. (povus esti la eminenta Koko de la pluma korto), estas Kálmán Kalocsay, figuro kiu elstaras kaj elstarigas nian lingvon kaj literaturon (kiel proklamis multaj, kiel Lajos Tárkony, Marjorie Boulton, Gaston Waringhien...). Kun verkistoj kiel li, "aliaj projektoj sonas rilate al Esperanto kvazaŭ matematika formulo apud sono". Ni ja povas fieri pri nia esprimiva idiomo ("Lingvo kaj sento, jen estas Esperanto. La lingvo vivas en sia literaturo, la sento parolas per poezio"). Poste, Enrique Navarro rakontis kiam li veturis al Hungario kaj vizitis persone al K. Kalocsay. Li deklamis la belajn tradukojn "Kanto de hundoj / Kanto de lupoj". Fine, ni povis gustumi kelkajn versojn kaj erojn de bonfarulino. [Parenteze, la citaĵoj estas de K. K.].

En alia tago, kiel tradicie, okazis frateca tagmanĝo. Ja en Hispanio, celebri kutimas signifi manĝi kaj trinki festume. Kaj ni profitas por tosti je Esperanto kaj je ĉiuj esperantistoj!

Lorenzo Noguero



Madrido (Fuenlabrada)

En 2023 la Zamenhofa Tago okazis en la sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo, la sabaton 16an de decembro, ekde la 11a horo. Kunvenis 20 homoj el urboj Fuenlabrado, Madrido kaj aliaj. Dum la mateno okazis kvar prelegoj pri diversaj temoj: egiptologio, ŝako, filipinaj lingvoj, homaj rajtoj. Post la komuna tagmanĝo en proksima restoracio, ni revenis en la sidejon kaj pasigis du pliajn horojn per tabloludoj. Por la okazo ni fiksis grandan E-flagon ĉe la strata pordo de la sidejo.



Valencio (Cheste)



Kutime la Zamenhofa Festo okazas en Valencio, sed ĉi jare ni translokiĝis al la proksima urbeto Cheste.

Ne estis la unua fojo, ke Chestanoj kaj Valencianoj kunmanĝis zamenhoftage, sed ĉi jare ni volis tiel festi, ĉar ni kunlaboras en la starigo de la venonta Hispana Landa Kongreso, de septembro, 2024. Nia tagmanĝo, kiu okazis en la enurba restoracio Cánovas, estis

bone preparita, kaj kostis po 16 eŭrojn, kun kafo por fini. Elias de la Valencia Grupo antaŭmanĝe sendis al nia vacapa babilejo la tutan tekston de la Himno de Esperanto, do ĉiuj povis kanti ĉiujn vortojn. Nur mankis la muziko de la himno, kaj kvankam ĉiuj bone lege kantis la vortojn, ne ĉiuj konis la muziknotojn, kio kreis iom da misharmonio en la sankta harmonio, ni diru.

Dennis Keefe
Cullera (Valencio)

Teruelo



La membroj de LIBERANIMO, esperanto-asocio de Teruel' festenis la Zamenhofan Tagon la pasintan 11an de decembro. Unue okazis la ĝenerala kunveno de la asocio, diskuto pri la projektoj de agadoj de la asocio dum la venonta jaro, disdonado de la kartonoj de LIBERANIMO kaj elekto de la estraranoj. Poste, frata vespermanĝo Alberto Granados

Sevilo

En la urbo Sevilo, la 15an de decembro ĉirkaŭ 20 homoj kunsidis ĉe la konata restoracio "Campeones", okaze de la Zamenhof-Tago. Ŝajnas ke ili gardas agrablan memoron pri la okazinta kongreso, ĉar preskaŭ ĉiuj kunsidoj por diskuti kaj prepari la kongreson, okazis en tiu restoracio.



Bilbao



La vendredon 15an de decembro, 14 homoj kuniĝis en la sidejo de la E-Grupo de Bilbao por kunmemori la naskiĝtagon de Ludoviko Zamenhof.

Post mallonga parolado kaj komuna vespermanĝo, homoj stariĝis ĉirkaŭ pianolo por aŭskulti ludadon de nia amikino Susana Zabaco kaj kunkanti La Esperon en amikema etoso.

Alikanto

Guadamar del Segura



Ni festas Zamenhofan tagon en Guardamar del Segura (Alikanto). La Esperantistoj de Alicante -Provinco finis la tagon fermante la ekspozicion en la loka Biblioteko de la Urbodomo

Kantabrio

La pasintan 16an de decembro 2023 kelkaj esperantistoj de KantEA (Kantabra Esperanto-Asocio) kuvenis en restoracio de la ĉefurbo, Santander, por kune festi la Zamenhoftagon.



APERO EN AMASKOMUNIKILOJ

Artikoloj pri Esperanto aperis en diversaj okazoj en la gazetaro, okaze de la Hispana Kongreso en Sevilo. Ekzemple, oni anoncis la kongreson en "Diario de Sevilla", en "La Voz del Sur" kaj en la loka stacio de la ĉeno SER.

La programo "Soy Sevilla" ĉe la loka televido "101 Televisión" intervjuis plurajn membrojn de la kongresa organiza komitato. Vi povas spekti la pecon ĉe ĉi tiu ligilo: https://www.youtube.com/watch?v=PQ8a-B_1Oy8 (de la minuto 16:17 ĝis 25:55).



La programo "Memoria de delfín" de Radio Nacional de España dediĉis la elsendon de tiu semajnfino (en la fruaj horoj de la 16-a de oktobro) al Esperanto. La programo en-



havis intervjuon kun la direktoro de la Fondaĵo Esperanto, Toño del Barrio, kaj raporton pri Esperanto-klaso, kun instruisto Félix Jiménez kaj pluraj lernantoj. La programo estas aŭskultebla kaj elŝutebla ĉe ĉi tiu ligilo: <https://www.rtve.es/play/audios/memoria-de-delfin/esperanto-lenguaje-inventado-facil-aprender/6988396/>

GRAN MADRID

ENTREGAS Y GATOS

En plena etapa XXI, el mundo de la cultura se enfrenta a un momento de incertidumbre y de grandes cambios. Por eso, es necesario que se abra un espacio de diálogo y de reflexión que permita a los actores culturales encontrar nuevas formas de organización y de acción.

